Filipina Esperantisto

Organ of the Philippines
Esperanto Association


VOL. II., No. 9-10 MAY-JUNE, 1909



STATISTIKA TABELO

DE

'Ciuspecaj Esperantista Societoj



Digitized by Google

TO ESPERANTIST GROUPS

The commodious club rooms
known as
ESPERANTO HALL,
85 calle Gastambide
are placed at the disposal of
Esperantists desiring to conduct classes, hold meetings, social reunions, etc.
FREE OF CHARGE

For particulars apply to
THE CURATOR
Esperanto Hall
85 Gastambide

ESPERANTO HALL—CONSTITUTION

NAME:—The name shall be "Esperanto Hall"

OBJECT:—The object shall be to maintain club rooms in Manila that may be used as a rendezvous for Esperantists, where members can at any time hold classes, lectures, meetings, or musical, dramatic and social soirees, in the interest of the Esperanto movement.

MEMBERSHIP AND DUES:—Any person may become a member by paying a monthly fee of one peso (in advance) and shall be known as a "sustaining member." Funds to be devoted exclusively to rent and furniture.

GOVERNMENT:—The government of Esperanto Hall shall be entirely in the hands of a House Committee consisting of three sustaining members (one of these will be a resident in the Club building and will be known as the curator). Permission to use the club's premises shall be at their disposition and they may draft such regulations from time to time as they may deem expedient. They shall call the annual meetings in the month of June and any special meeting should occasion arise. A quorum to consist of seven.

Digitized by Google

KORESPONDADO

Deziras korespondadi postcarte:

S-ro J. HARPER BARSE, Herkimer, N. Y., U. S. A.
S-ro RUDOLF HILDING, Koinge, Sweden.
S-ro ALF. RICHTER, Fürstenstr., 28, Dresden A. Germany.
S-ro ARMAND CADOUX, 20 Rue du Cavalier, Vierzon, Cher, France.
N. KUZMIN B. JAKIMANKA, d 22, kr 29 Moskva, Russia, deziras korespondadi kun entomologlistoj kaj insekt-kolektistoj.
S-ro MARCEL BIBAUT, 20 Rue de Paris, Saint Denis, Seine, France.
S-ro MARCEL LEVY, Frue Porte a Meuse, St. Mihiel France.
S-ro ANTONIO FRIDURI, Calle San Jorge 83, Mahon, Islas Baleares, Spain.
S-ro ISTACE, 2 's Keeren str., Antwerpen, Belgium.
S-ro K. NOHARA, Chofu, Yamaguchi-ken, Japan.
S-ro R. G. HULBURT, Taylor, Nebraska, U. S. A.
S-ro T. NAKAMRA, Yurakusha, Marnouchi, Tokio, Japan.
Otto Metzger, Prag-Wysocan No. 196, Bohemia, Austria.
S-ro H. Wuttke, Pionierstrasse 21, Magdeburg, Germany.
S-ro Frantisek Kall, Praha VIII, 798, Austria
S-ro Th. Svendsen, Aalbargvej 40, Hjorring, Denmark.
S-ro I. Ivanovski, students-medicinisto, Kavalergard-skaja 16, lg. 13, St. Petersburg, Russia.
S ro Marcel Levy, Frue Porte a Meuse, St. Mihiel, Meuse, France.
F-ino V. A. Adomovic, Jensko-Medicinsij Institut, Arhierejskaja ulica, St. Petersburg, Russia.
S-ro U. S. Lizlov, Reala lernejo, Sumi, Harkovskoj gub, Russia.
S-ro Fr Peessnegger, Choceu, Bohemia, Austria.
S-ro N. Hohlov, 18 Maryno domo, 18 Otdelenje derev Moscow, Russia.
S-ro Jan.Balley, Doudlevce c. 18, Bohemia, Austria.
S-ro PLATO ORPHANIDHIS, Aiden, Turkey, deziras intersangi ilus. kolor. postkartojn, kun Filipinaj geesperantistoj. Ciam respondas.
KAREL HALADA, Kralupys Vlt. apud Praha, Bohemia, Austria, intersangas ilus. postkartojn, postmarkojn por filatelistojn, leterojn kaj ciujn objektojn.
FRANZ GEISLER, minoficisto, Fortschrittschacht, Dux, Bohemia, Austria, deziras korespondadi kun geallanduloj per ilus. postkartoj au leteroj, kaj deziras intersangi postmarkojn.
G. WERNICKE, komercinstruisto, Bremen, Ansgaritor-str. 22, Germanujo, deziras korespondadi kaj intersange postmarkojn.
S-ro K. HLARVATSCH, Bahnhofstrase, Teplitz, Bohemia, Austria deziras korespondadi per ilust. postkartoj; tu respondos.
S-ro I. SHKABARA, Nikolaevskaja 33 log. 24, S. Peterburg, Russia, deziras korespondadi, per ilust.-postkartoj kun ekstereuropaj gesamideanoj; ciam tuj respondos.
S-ro N. PARKEVIC, Nikolaevskaja 33 log. 24, S. Peterburg, Russia, deziras korespondadi per ilustritaj postkartoj kaj intersange postmarkojn.

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

U. E.-A. celas plifaciligi la ĉiuspecajn rilatojn inter diverslingvanoj kaj krei fortikan ligilon de solidareco inter siaj membroj. Ĝi organizas per Esperanto diversajn internaciajn servojn tuj uzeblanjn de la personoj, kiuj vojaĝas, komercas, korespondas, rilatas kun alilingvanoj pri ĉiuspecaj fakoj. Ĝi klopodas, por starigi en ĉiuj lokoj konsulojn, Esperanto-Oficejojn, kiuj helpas al la trapasantaj samideanoj; ĝi organizas ekskursojn, esperantajn libertempajn koloniojn, Esperanto-hotelaron, komercan servon por ĉiea disdonado de reklamiloj, k.t.p.

Ĉiu membro ricevas membrokarton, kiu donas al li la rajton senpage uzi la servojn de U. E.-A. La kotizaĵo por 1909-1910 estas 36 Sd. (₱o.36).

Por ĉiuj informoj sin turni al la loka Delegito S-ro I. Arnalot, Hotel de France, Manila aŭ al ESPERANTIO, 8, rue Bovy-Lysberg, GENEVE (Switzerland).

Ĉiuj grupoj, kiuj ne ankoraŭ elektis Delegiton al U. E.-A. estas petataj tion fari kiel eble plej baldaŭ.

Ĉiuj izolaj Esperantistoj, kiuj bonvolus akcepti, la taskon de Subdelegito en sia loko, skribu al la supra adreso.

Subscribe to the fortnightly gazette "Esperanto!"

THE OFFICIAL ORGAN OF THE : : :
UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

The Universala Esperanto-Asocio, with head offices at Geneva, is the recognized bond of Esperantists of all lands; a powerful combination for universal propaganda effort and practical utility. Every Esperantist should at least subscribe to its official organ "Esperanto."

Annual Subscription to "Esperanto" - - -	₱1.60
Membership card in U. E.-A. - - - - - -	.36
Badge U. E.-A. - - - - - - - - -	.30
Jarlibro of Delegates, etc., U. E.-A. - - -	.25

Subscriptions forwarded by W. H. Case, Box 326, or by the U. E.-A. Delegate, Mr. I. Arnalot Hotel de France.

Digitized by Google



The Smle of Satisfaction

on the face of
every smoker
who lights a
"JOSE RIZAL" CIGAR
continues until the stub
is tossed away. Reason:
Every cigar is the same
cool, refreshing smoke
from start to finish.

INSIST ON GETTING A

Jose Rizal

Remember the money is
yours and that dealers
seldom offer a substitute
or "something just as
good" for your benefit.
This cigar is sold by
all live dealers who
cater to the wants of
their customers

Walter E. Olsen & Co.

TWO STORES:

Kiosko Habanero
27 Escolta

Kiosko Rizal
168-170 Escolta

AT ONE PLACE

IN MANILA YOU CAN GET SHIRTS AND UNDERWEAR MADE TO ORDER BY EXPERIENCED CUTTERS WHO ARE EXCLUSIVELY DEVOTED TO THIS LINE; ALL ARTICLES WILL BEAR THIS MARK

MANILA SHIRT FACTORY
MANILA

WHICH IS A GUARANTEE OF FIT, WORKMANSHIP, QUALITY AND COMFORT

127 ESCOLTA
Moderate prices

Fresh Films,

Plates and Paper

Illustrated
Postcards

KODAKS AND CAMERAS

DEVELOPING AND PRINTING

PHOTO SUPPLY CO.
145-147 ESCOLTA
MANILA

Digitized by Google

Filipina Esperantisto

Organ of the Philippines Esperanto Association

P. O. Box 326, Manila, Filipina Insularo

An Esperantist's Impressions of Dresden

By CHARLES S. BANKS

PART III (conclusion)

Saturday morning, being the time for closing the Congress formally, only one other feature of importance occurred during the last day of the Fourth International Congress of Esperanto, and that was the "Festo de la Revuo."

"La Revuo" being the chief literary exponent of Esperanto it was quite appropriate that the editors of this periodical should arrange a program which would demonstrate to the world of Esperantists and others the utility of the language from a literary point of view as well as its practicability for the lyceum.

A large and enthusiastic audience gathered in the Assembly Hall of the Teknika Lernejo at 2 o'clock, and by half past two there was absolutely no more standing room on the floor or in the galleries.

On the platform sat the editor of "La Revuo" together with Dr. Zamenhof, Dr. Boirac, the newly elected President of the 1909 Congress, Dr. Mybs, Dr. Arnhold, Mr. Mudie, Dr. Bein and others, while those who were to participate in the discourses, the musical numbers and the distribution of the Revuo's prizes occupied seats immediately in front.

The program as prepared was enthusiastically received, especially the vocal and instrumental selections by S-ro Viktor Bendix, the composer, S-ino Sahla and F-ino Helena Forti of the Bohemian Opera. An interesting feature was the awarding of prizes to the Dresden policemen who had taken up Esperanto to enable them to assist the visitors to the Congress.

Prizes were also awarded to those pupils of the Dresden public schools who had made most progress during the year in Esperanto.

The result of the Revuo's voting contest to determine the writer of Esperanto who shows the best style, was announced as in favor of Dr. Bein, the able translator of "La Faraono," and Dr. Bein was enthusiastically applauded. A short speech by the majstro congratulating "La Revuo" and the participants in the prize competitions, with words of encouragement for a continuation of efforts for 1909, closed this extremely interesting program after which the audience sang the beautiful hymn "L'Espero," and the members of the Kvara Internacia Kongreso de Esperanto were free to go to their homes in every corner of the earth to spread the gospel of a common tongue and a better understanding among men.

Our last Sunday in Dresden was divided among services at the English Episcopal Church, a visit to the art gallery and a trip to Weisser Hirsch in the afternoon. At this last beautiful place many Esperantists had gathered for saying good bye and for a luncheon. One of the Saxon regimental bands furnished music for several hours while we gay and hungry excursionists made merry among ourselves.

To most of the Esperantists Dresden held no special things of interest after the close of the Congress, but I had, previous to leaving for Europe, planned to see the Dresden Museum and meet personally some of my scientific confréres with whom I had only had a correspondence acquaintance. Even during the busy days of the Congress I had found time to steal away in search of this or that one whom I had wished to see.

Thus the three days after the close of the Congress were spent at the museum, the green vault, the royal palace of sculpture, the zoological gardens. Our last Tuesday in Dresden found us once more at the Art Gallery for one brief hour which was spent in contemplating for the last time the incomparable "Sistine Madonna" which we had already seen twice before. Surely no canvas of any time has such a wonderful influence upon the beholder as this masterpiece of Raphael.

Dresden, the city of 500,000 inhabitants, does not seem to be so large, possibly because of the great perfection of its tramway system, by which one can go to every part of the municipality and its suburbs. The *Altstadt*, the kernel of the city, lies in its center, the newer parts of the town having been built around instead of on one side of the new. The magnificent new city hall, built of rose-colored sandstone, rises in the very center of the old town.

Digitized by Google

Built after the renaissance type it yet has enough of the modern to please the less classical eye.

The Hofkirche, the Zwinger, the Opera House, the Houses of Parliament, the Fraŭenkirche and the Royal Belvedere, all lend the dignity of their beautiful facades and symmetrical towers to the panorama while the five great bridges which span the Elbe are best seen from the top of the Bruhl'sche Terrasse, on the south side of the river.

Were I asked to give a nickname to Dresden I should call it the "City of Pictures." Nothing strikes one so forcibly as the array of art reproductions seen on every hand in the shops of the business portion of the town. Beautiful counterfeits of those treasures to be found in the "Zwinger" are to be had at most remarkably low prices to that the poorest can have them to adorn his home.

But Dresden could not hold us always spite of our fascination, even love for it. We had to leave, and Wednesday evening, the 26th of August, saw us bid farewell to this beautiful town on the Elbe. Our hearts had truly been kindled toward it and our desire would have been to remain and know it better. But we could not.

The evening sun tinted the cross upon the dome of the "*Kreuzekirche*," the spire of the Fraŭenkirche seemed a great finger beckoning us to return and tarry longer. We did not say good bye. We only said *au revoir*.

Va Internacia Esperantista Kongreso

BARCELONO

5-a—11-a Septembro 1909-a

ALVOKO

Karaj Gesamideanoj!

Barcelono estas la urbo simbole elektita de Cervantes por revenigi Don Kiĥoton,—tiun grandan frenezulon!—en la realan vivon. Vojoj polvoplenaj, gastejoj malpuraj, montoj senherbaj, senhomaj ebenaĵoj estas la arenoj, la turnirejoj de la freneza kavaliro; sendankaj kaptitoj, paŝtantaj brutaroj, muelilaj aloj, procesiantaj religiuloj estas liaj malamikoj kaj kontraŭstarantoj. La kastelo de fantaziaĵoj devis ruiniĝi en Barcelono, kie la sento de la realaĵo estas granda, kaj kie la entuziamo ŝveligas la korojn, sed ne suprenflugigas ilin kiel aerostatojn. Sur sablaro, hodiaŭ al la maro rabita de la pligrandiĝo de la urbo, Don Kiĥoto falis venkita de la kavaliro de la Blanka Luno, kaj senarmigita, neniigita, malĝoja, li revenis sur la vojo de la resaniĝo al la fina resaniĝo de sia malsana cerbo. Li forportis kun si la memoron de la presejoj, riĉaĵoj, belegaĵoj, gastameco de la grafa urbo, kaj ekkriis, pri Barcelono parolante: "Barcelono, arĥivo de la ĝentileco, rifuĝejo de la fremduloj, hospitalo de la malriĉuloj, patrolando de la kuraĝuloj, venĝo de la ofenditoj, afabla korespondado de amikecoj firmaj, kaj senegala pri sidejo kaj beleco" (Ĉap. LXXII., II-a parto).

Nun, en la nuna ora refratiga tempo, Barcelono estas denove elektita, kiel scenejo de simila fakto. Trakuras la Homaron, ne nur unu sola kavaliro, sed armeo de frenezaj kavaliroj, kiuj ĉie nur vidas malamikojn kaj kontraŭstarantojn. Nur kiel malamikojn, ili rigardas la fratojn pacemaj, laboremajn, trankvilajn, kies nura peko estas: esti malfeliĉaj. La grandaj konstruajoj de la moderna kulturo, de la ĉiama kulturo estas por tiaj frenezuloj, nur ensorĉitaj kasteloj, kie—laŭ ili—homo laboradas venĝojn kaj malbonon. La movon de la brakoj, kiuj tra montoj kaj limoj volas sin ĉirkaŭpreni, la frenezaj kavaliroj vidas nur, kiel minacon. Kaj ili, kiuj per siaj timoj ĉion malaranĝas, ili paradas, kiel repacigantoj de la paco, kiel rebonigantoj de la bono, kiel venĝintoj de tio, kion neniu eĉ pensis venĝi.

Estas necese revenigi tiajn frenezulojn en la realan vivon, montri al ili, ke ni ĉiuj estas amikoj, ke la tiel laŭte proklamita de ili diferenco kaj kontraŭsenteco de la homoj, estas falsa; ke ne estas alia sorĉo, ol la sorĉo de la amo, kaj ne alia malamo, ol la malamo al ili mem. Tio ĉi estos proklamata, kantata, kriegata antaŭ la tutmonda Kiĥotaro, ne, certe, de la Kavaliro de la Blanka Luno, sed ja de la kavaliro de la Verda Stelo, en niaj placoj kaj stratoj, teatroj kaj kunvenejoj. Kiu el vi, karaj gesamideanoj, ne volos ĉeesti tiun gravan modernan batalon? Kiu el vi, frataj sambatalantoj, ne volos partopreni en la rondo, kiun ni faros ĉirkaŭ ambaŭ batalantoj: la malnova, tradicia, erara, atavisma spirito,—kaj la nova, frata, ama spirito de Esperanto? Kiu el vi ne volos alporti la bruon de siaj aplaŭdoj al la senarmiligo de la tutmonda Kiĥotaro? Mi estas certa, ke ĉiuj vi, fidelaj masonistoj de homara konstruaĵo, ne rifuzos ĝui tiun grandan ĝojon; kaj en la batalo kontraŭ la veraj frenezuloj—ĉar ne ni, sed ili estas vere tiaj.

* * * * * *

Gefiloj de ĉiu lando! venu Barcelonon restarigi la grandan rondon familian!

FRED. PUJALÁ Y VALLES,
La Prezidanto de la Loka Komitato.

Digitized by Google

BIBLIOGRAFIO

LA REĜO DE LA MONTOJ de Edmond About, Esperantigis G. Moch—Hachette; Fr. 3.50.

BRAZILIO, parolado de E. Backheuser—Hachette.

CONSILIUM FACULTATIS komedio en unu akto, el lingvo pola trad. A. Grabowski—Jan. Gunther, Varsovio, Sm.40.

ELEMENTA FOTOGRAFA OPTIKO, originale verkita en Esp. de Karlo Verks—Librejo Ch. Mendel, 118 bis. Rue D'Assas, Paris, Fr. 1.25.

ESPERANTA BIBLIOTEKO INTERNACIA N-oj 1 & 2, (Legolibreto) (Fabeloj de Anderson,) ĉiu Sm. 10, Moller & Borel, Berlin.

PICTURE LESSONS IN ESPERANTO by S. R. Marshall and W. W. Mann with 12 posters intended for Class Teaching—B. E. A'ssn., London, 5s.

NOVA ANTOLOGIO, Antoni Grabowski—Jan. Gunther, Varsovio, Sm. 25.

DECIDOJ KAJ |DESIROJ Voĉadonitaj de 9-a Kongreso Inter. Geografio—Inter. Scienca Rev., Genevo.


INTERNACIA MONUNUO KAJ PAGILO de Ĉefeĉ, Inter. Prop.-Esp., Merton Abbey, London, S. W.

NOVAJ GAZETOJ

EXPORT ESPERANTISTO (monate) Chicago Ill. $1.00.

LA ONDO DE ESPERANTO (monate) Moskvo, Ruslando.

LA SIMBOLO (monate) Tacoma, Wash., $1.00.



Digitized by Google

[TAGALOGA LINGVO]

Ang Kahalagahan ng wikang Esperanto

Pinagpipitaganan kong mga kababayan:

Ang pusù ko'y lunod na lunod sa mga kagalakan; ang aking katuâan ay walang kalagian sa mga gabing ito upang ang lahat ay aking maisiksik at maitagò sa kaibuturan ng pusù, walà ngâ at ang lahat ay punû na.

Ang dahil ng ating pagkakapisang ito'y walang iba kundî paunlakan ang ngayo'y dumalaw sa atin na taga ibang bayan na kung dî ako namamalî ay sila ang mga nangangasiwâ sa isang kapisanan dito sa Maynilà na ang pamagat ay FILIPINA ESPERANTISTO, tagapagtangol at tagapagpalaganap ng wikang Esperanto, at sapagka't iyang wikang iyan ay isa sa mga kinagigiliwan namin at hangad na matutuhan dito sa aming kapisanan (Luningning), kung kaya aking sasalaysayin sa inyo ang kahalagahan ng wikang binangit.

Ang Esperanto ay isang wikang pangkalahatan gawâ ng isang Polaco na nagngangalang Dr. L. L. Zamenhof, at ang kaniyang kauna-unahang aklát ay nilimbag noong taong 1887. Ang Esperanto ay walang ibang layon kung dî ang tayo'y papaglapit-lapitin, magkaroon tayo ng isang wikang pangkalahatan at ang mga naninirahan dito sa sangsinukob ay magkawatasan sa pamamagitan ng isang wikang iyan. Hindî niya hangad na sirain ó iwalat ang mga dating salità na ginagamit ng bawa't lahî at papanatilihin ang kaniya, kundî ang maging pangalawang wikà man lamang; kung iyan ay ating matutuhan ay para na nating natutuhan ang lahat ng wikà sa sangdaigdig, pagka't tayo'y maaaring makipag-usap sa lahat ng bansâ ó lahî.

Dito sa Pilipinas na bago-bago pa lamang kalalaganap niyang Esperanto ay kinagiliwan na ng maraming Pilipino, sa katunaya'y may Colegio na dito sa atin na nagtuturò niyang wikang iyan. Ang mga ibang kapisanan dito ay nangagsisianib sa malusog na kapisanang FILIPINA ESPERANTISTO, kayà ngâ't dî maglalaón at lalong dadami ang marunong ng Esperanto dito sa Pilipinas.

Marami na ang bilang ng mga naaanib sa tinurang kapisanan at ang karamiha'y mga bantog na Pilipino.

Ito'y katunayan na ang mga Pilipino'y magiliwin sa karununggan at dî marunong magpabayà tungkol sa ikagagaling ng kaniyang bayan.

Maibibilang na tayo ang huling nagaaaral ng Esperanto, pagka't tayo'y nasasa




MA

kamay pa ng mga kastilà ng ito'y lumaganap sa mga bayang lalong bihasa lalonglalò na sa Europa.

Kahima't tayo'y hulî na kay sa ibá, tungkol sa pag-aaral niyang wikang iyan, ay dî tayo dapat magpabayà at ako'y nananangan sa katalinuhan at katiyagàan sa pag-aaral ng aking mga kababayan.

Dî ko nasang takbán ó paibabawan ang ating sariling wikà, pagka't ¿sinong tao ang magnanasang alisin ang kaniyang sariling wika't palitan ng sa ibá? Sa bantà ko'y walâ, kundî ang nais ko'y maging pantulong man lamang sa atin, na kung ibig nating makipagsalitaan sa Hapon, Frances, Italiano, Ruso, Aleman, ó Portugues ay dî na tayo kailangang mag-aral pa ng kanilang sariling wikà ó humanap ng isang "intérprete" upang sila'y ating makaintindihan, pagka't tayo'y may isang wikang pangkalahatan na magagamit.



MA

Digitized by Google




Kayà nğâ, mğa kababayan, ako'y nananangan sa inyong pagka mahiligin sa pagaaral na kayo ay dì magpapabayà; ang Gramátika niyang wikang iyan ay natutuhan sa loob nğ isang oras; at sa aking akalà ay maaarî na kayong makapagsalità at sumulat nğ wikang Esperanto sa loob nğ mğa dalawang bwan kung atin lamang pagsisikapan.

Malakî ang pasasalamat ko sa katalinuhan at katiyagaan sa pagkatuklás nğ ating mğa ikapaglalapit ni Dr. L. L. Zamenhof; at gayon din naman malabis ang aking pasasalamat sa mğa nagsipagtatag nğ kapisanang FILIPINA ESPERANTISTO, pagka't sila'y makatutulong at makapagpapalaganap dito upang iyang wikang iyan lumusóg at kagiliwan nğ tanang Pilipino.

Nasabi ko na,

PEDRO F. DE JESUS, Kalihim,
Pandakan Esperantista Grupo.



KORESPONDADO

Pandakan, la 13an de Majo, 1909.

Al Sinjoro Sekretario-Kasisto de l' "Filipina Esperanto Asocio."

Estimata Sinjoro: Interesata pri la antaŭeniro de nia lingvo, mi havas la honoron sciigi al vi kaj al la tuta samideanaro novajon, kiu okazas en tiu ĉi urbeto.

Iam ne longe kelkaj entuziasmaj junuloj esperantistaj fondis societon, kiun ili nomis *Pandakan'a Esperanta Grupo.* Ĉi tiu celadas antaŭ ol ĉio la instruadon kaj divastigadon de nia afero inter la ĉitieaj loğantoj.

Nu, la proviza komitato invitis la gejunularon kaj aliajn al la unua kunsido, kiu okazis la 8an de tiu ĉi monato ĉe la domo 72a Labores, oferita ğentile de ğia mastro, S-ro Evaristo de los Reyes.

Bedaŭrinde je la vespero falis pluvon, kiu malhelpis multe por ke la geinvitaj povas aliri la kunsidejon.

Tamen, je la 4.30 an, la prezidanto de l' komitato malfermis la kunsidon kun pli ol kvindek geenestantoj. Li klarigis la fundamenton de tiu grupo, la kialon de la aferoj kiujn ği penas atingi, kaj fine rememorigis al la aŭdantoj la klopodojn, la senĉesajn laborojn de tiuj samideanoj kiuj senlasemaj antaŭen sekvas iliajn divastigantajn movadojn faligante barojn, kiujn la supertico kaj ignoranteco de l' popoloj al ni, oferas. Tion ili faras, sed sen espereblaj fruktoj, sen rekompenco deziratajn vidi la homaron, je estonta tago, kun unu lingvo komprenita de ĉiuj, kun unu lingvo subtenonte la ligon de la homaj koroj, kun lingva ilo de universala frateco, forgesante ĉion, pri la Babela turo.

Estas vere, ke la ekzisto de tiu turo kiel histora, sakra fakto devas esti kredata de ĉiuj; sed ne estas malpli certe ke la eminentaj filologoj, la plej famaj scienculoj, precipe la pli multaj poliglotoj pruvis, pruvas kaj pruvos la ekziston de banto kiu ligas eĉ la plej diversajn lingvojn de l' mondo. Nun tia banto, sendube, povas esti la fundamento de alia lingvo facile sciigebla al ĉiuj kaj baldaŭ komprenita en diferentaj landoj. Nin ĉikanas multaj homoj, kiuj juğas nekomprenante tion, al kio ili provas doni sian opinion; estas kredebla, do, ke samideanoj kiuj volas konvinki ilin, devas klarigi ke ni tre multe bezonas lingvon taŭğantan por ĉiuhoma kompreniğo.

Tial la prezidanto post kelkaj aliaj vortoj, prezentis Sinjoron Jozefo Ciria

Digitized by Google

Cruz, kiu paroladis pri sia temo. Prave estis li en lia parolado, kaj siaj klarigoj estis feliĉe ricevitaj de la aŭdantaro. Li diris: "Se ni povus divastigi lingvon kompreneblan de ĉiuj, tiam ni malaperigus malfacilecon ekzistantan jam ne nur en aliaj landoj, sed ankaŭ en nia propra insularo, en nia malfeliĉa patrujo kie la diverseco de lingvoj kauzas multe da ĉagreniĝoj ne nur al fremduloj, sed al ni mem la filipinoj. Se ni povus divastigi lingvon kompreneblan de ĉiuj ni unuiĝus la dezirojn de alilanduloj kun tiuj de niaj gesaminsularanoj. Ili komprenus nian staton; se ni sentus grandan malfeliĉon, se ni estus kompatindaj, eble estas, ke ili aŭdus nin, helpus por atingi nian neceson, ĉar ili havas ankaŭ korojn kiuj ne dormas sed ĉiam korbatas. Kion ili farus, pro iliaj ekzemploj, ni ankaŭ farus saman se malhelpeco de l' sorto falus sur ilin. Tiam ni apudigus malproksimajn loĝantojn. Li finis kun la jenaj vortoj: "La grandaj faktoj, la mirindaj elpensaĵoj, estas akceptitaj de tutmondo pro la kompreno de siaj signifoj, la sciiĝo de sia utileco. La senfadena telegrafio ne estis kredata de ni kvankam oni diris al ni, senmontrante en kio li konsistas, nek ni atentis ĝin; sed unufoje vidinte la elmontrojn, pruvinte ĝian metodon, fundamenton, leginte tekstojn pritraktantajn pri ĝi, ni ne povas malpli laŭte diri: estas certe tio okazos en nia afero, la bezonas de lingvo internacia vi jam aŭdis sed vi ne kredas la eblon atingi lian solvon. Se vi jam kredas la neceson de tia ilo de kompreniĝo, klopodu kaj ĝi eliros."

Kelkaj vortoj del prezidanto konigis la aŭdintaron, ke S-ro Amado Bonus esprimos ideon pri Esperanto kiel vera solvo de ĉiuhoma kompreniĝo. Leviĝis la prezentito kaj elmontris la malfacilecon de naciaj lingvoj por esti akceptitaj kiel internaciaj. Li nomis la latinan, grekan, anglan, francan, germanan, k.c. lingvojn, pruvis iliajn neeblecojn por internaciiĝi. La alinacianaj, diris la parolinto, ne volos propagadi lingvon de alilando, anstataŭ tio ili jam penos divastigi la propran; anstataŭ lerni alinacian gramatikon kaj vortaron ili preferos pliperfektiĝi en la lingvo, kiun ili ricevis de ilia patrino. Supozante ke kreskus la divernacia lingva propagando, tiam la divastigantoj farus nenion por la unueco de kompreniĝo, kontraŭe ili helpus multege por desigi ĝin. Li pruvis ke tiel la mortaj lingvoj kiel la vivaj bezonas multejaran lernadon pro malfacileco de gramatikoj precipe vortdiradoj kaj vortmemorigoj.

Poste la parolis pri tri internaciaj lingvoj: Volapuk, Blua lingvo kaj nia Esperanto. Vidiginte ke la du unuaj ne havas la kondiĉojn kiujn Esperanto donas al ĉiuj por faciligi la studadon. Li konkludis ke la lasta estas seniadube, inda esti lernata kaj divastigata de ĉiuj kiuj volas helpi al nia afero.

La prezidanto leviĝis, kaj disdoninte propagandajn follojn pri Esperanto, anoncis ke la duma komitato estas preta respondi dubon de kiu ajn.

Dek minutoj pasis, neniu alvokis la atenton de l' komitato pri io.

La prezidanto permesis paroli S-ron Pedro de Jesus, kiu traktis pri la vortoj de nia Majstro, D-ro Zamenhof; memorigos tion "semas kaj semas; cent semoj perdiĝas; mil semoj perdiĝas," de l' Krestomatio, kaj fine li konsilis la metodon por kreskigi la aferon.

La komitato devis esti anstataŭita de alia elektota; tial oni voĉdonis kaj resultis la jenaj gesinjoroj:

Por la Direkta Komitato.

Prezidanto: D. Anunciación.
Sekretaristo: Pedro de Jesus.
Kasistino: F-ino Feliza Fermin.

Helpantoj: Manuel S. José, Eliseo Tiongson kaj Guillermo Carreon.

Por la regulara farado.

Prezidanto: Amado Bonus.

Helpantoj: F-ino Cayetana Fermin, Manuel San José kaj José Ciria Cruz.

La novelektita komitato anstataŭis la antaŭan, disdonis revuojn, gazetojn, ŝlosilojn, k.t.p. kaj finigis la kunsidon ĉe l' bato de sonorilo.

Pli ol tridek novaj geanoj aligis sin al nia kaŭzo.

Sincere via,

D. A. Bonus.

Literatura Almanako
de Lingvo Internacia por 1909

enhavos resumon de la historio de Esperanto en 1908, redaktitan de ĝia lerta kunlaboranto D-ro P. Corret, la fotografaĵojn de la 12 nunaj Akademianoj kun biografiaj notoj kaj kelkaj paĝoj speciale verkitaj por tiu libro de ĉiu el ili; poezioj, rakontoj, studoj. Fine: parto humora (esperantista, akademia, kongresa).

Tiu volumo estos absolute rezervita al abonantoj de "Lingvo Internacia." Aparte ĝi kostos 7 fr. 50 (3 Sm.), t. e. saman prezon, kiel la abono al la gazeto mem.

Digitized by Google

MIA AMIKO JONES

aŭ

KIEL ONI IUFOJE 'RIĈIĜAS' EN USONO.

Unu el miaj kunpasaĝeroj sur la sama ŝipo, daŭre de mia lasta vojaĝo al Usono, antaŭ du jaroj, estis lernejestro nomita Jones, kiu estis estinta en la Insuloj Filipinaj pli ol sep jaroj gajnante tre bonan salajron, tiel ke li povis ŝpari estimigeblan sumon da pesoj, post ne malmulte da suferoj kaj seniĝoj, kaj nun forveturis al sia naskolando por pace ĝui la rezultaton de sia longedaŭrada labor kun la ŝvito de siaj pensemaj kaj kunpleksitaj brovoj sub la preskaŭ netolereblaj sunradioj de tropika klimo. Li vojaĝis duaklase, pro ŝparemo. Li estas malaltkreska, tre babilema kaj afabla sinjoro. De tempo al tempo dum la vojaĝo mi kutimis malsupreniri al la kajutoj de la duaklasa pasaĝeraro por babiladi kun mia novefarito amiko pri aferoj estintaj kaj estontaj, pri okazintajoj rimarkindaj al li okazitaj en la daŭro de lia loĝado en la diversaj provincaj vilaĝoj, pri tio, kion li faros tuj kiam li ree piedpremos la gepatran landon, ĉar lia kapo ĉiam estis plena je ĉiuspecaj projektoj. Unu tagon li diris al mi: "Facile estas riĉiĝi en Usono, se nur oni estas iomete klera kaj havas la necesan entreprenecon; rilate al negocoj komercaj, bezonas, ke oni estu maltimema; antaŭa sperto ĉe tiu ĉi aŭ tiu fako de ili tute ne estas neprea kondiĉo por ke oni sukcesu: vidu, antaŭe mi estis nur taglaboristo en la konstruado de usona fervojo, kaj tagon mi vekiĝis al la sento de mia vera rango en la homara societo; tial mi eniris en la instruadan departementon, kiel lernejestro. Estas vere, ke mia kono pri la libroj estis nemulta, sed klam la edukada direktoro rigardis mian altforman ĉapelon kaj miajn orenkarigitajn okulvitrojn, kiuj donis al mi profesoran ŝajniĝon, li ekkonsideris min tute taŭga por alsendi al la Insularo. Mi eĉ nun kore dankas al vestaĵluisto, pro lia sperto pri tiela al mi utilega aliformigo, kaj ne malpli multe mi gratulas min mem, pro mia kuraĝeco kaj maltimeco. La mono estas la povo, sekve mia kesto en la ŝipkelo enhavas povon, kiu, kiel la pulvo, povas malbari ĉiujn malhelpojn de la vivvojo. Milo da bonegaj komercaj aferoj atendas min malpacience en Usono, kaj kiam vi revidos min post kelkaj jaroj vi min trovos en propra palaco kiel princo."

Alveninte al San Francisco kaj transpasinte en alian vaporŝipon por Seattle, mi okule perdis mian komercinkleman amikon, tute kiel lin elglutus la tero; sed la duan tagon li reaperis ĉe la manĝoĉambro je la horo de la tagmanĝo. "Ĉu miaj okuloj perfidas min, aŭ ĉu vi estis farinta vin nevidebla,"? mi demandis al li. "Nevidebla dume al vi, jes, pro mia foresto, kaj ankorau tiel al ĉiuj aliaj, pro la fumo," li respondis malrapide kaj kvazaŭ serioze. "Klarigu, do; ĉu pro la fumo kaŭzita per neatendita eksplodo de la pulvo malbarigvoja, pri kiu vi iam parolis al mi,?" mi diris, ridetante. "Jene la kialo: por ŝpari monon mi aĉetis triaklasan bileton, pensante tiel malpliigi kiel eble plej malmulte mian ŝparaĵon, por ke mi havu tiom pli por starigi komercadon. Sed la senhontemuloj intermetis min inter aron da malpuraj hinoj en la malluma kaj naŭsiga ŝipkelo, kiuj spite de la ŝipa regularo ne ĉesis fumadi siajn malsanigajn pipojn, tiel ke la fumo ŝajnis al mi kiel nigra antaŭpluva nubo kaj la marmalsano tenis min senmove en la lito, kaj tuj kiam mi sufiĉe reboniĝis, mi lasis tian inferon por eniri en vian ĉielon; mi tion estus farinta, eĉ ĝi kostus al mi mian tutan ŝparaĵon." Mia rideto, kiu akompanis liaj unuaj vortoj, iĝis ridego ĉe la fino de la konfeso, ĝis mi sentis doloreton ĉe la flankoj. Kia malsaĝulo estas mia amiko! kaj li riĉiĝos! Eble..... en alia mondo.

Post la elŝipiĝo, kaj dum duo da semajnoj, mi ree tute ne vidis mian kleran amikon je profesora ŝajniĝo, ĝis certa tago kiam mi hazarde renkontis lin sur la strato. Li estis elegante vestata per lastmoda vestaĵo, altforma ĉapelo kovris la kapon, kaj tra orenkadrigitaj okulvitroj liaj vivecaj okuloj ĝoje brilis. "Kiel elegantula vi estas farinta vin," mi ekkriis je la manpremo, "certe vi komerciadas." "Jes, la bonŝanco sekvadas miajn paŝojn, kiel la taga la nokton. Nur du horojn post nia elŝipiĝo, mi vizitis komercagenton kaj luprenis de li restoracion flanke de nove konstruita teatro. Tial ke la anonco pri tiu ĉi mongajnonta okazo jam aperis dum tri monatoj sur la ĉiutaga ĵurnalo, mirige estas, ke neniu antaŭ mi profitis je ĝi. Certe oni tute ne pripensis pri la por la restoracio alta valoro de la apuda malfermota teatro, kaj nur pri la iom kara luprezo. Se ĉiuj estus meditintaj, kiel mi, pri la granda negoco, kiun la restoraciluanto faros, kiam tiu ĉi teatro malfermos al publiko sian pordegon, pri la multegaj stomakoj, kiuj interakte kaj post la teatraĵo serĉos satigi sin en loko plej proksime kiel eble, je kia ajn prezo, tiam, je mia bedaŭro, mia restoracio jam de longe estus luita kaj la fondaĵo de mia estonta palaco ne estus ekkomencita." Tion dirinte, li

Digitized by Google

invitis min "viziti lian 'orminejon' kaj vidi ĝian interesan ekspluatadon." Eniraute, mi estis mirigata pro la luksa meblaro, je la plej aprobita modernstilo, malŝpare provizita per brilegaj speguloj kaj arĝentaj ornamaĵoj; multa kelneraro tre okupe movadis sin tien kaj tien ĉi kaj inter ĝi mi rimarkis du vere belajn kelnerinojn, kiuj, laŭ Jones mem, estas tre prudentaj, ĝentilaj kaj inteligentaj, ĉion kion mi ne dubis, speciale ke ili estas ĝentilaj. Klientojn mi nur vidis kelkajn, kaj espriminte mian miron pri ilia manko, mia riĉiĝonta amiko respondis: "Mi tute ne penas por kontentigi la nunajn malmultajn malsatiĝantajn kanajlojn, kiuj neniam antaŭe tiel bone manĝis, sed ĉiam plendas pri la prezo kaj la manĝaĵoj; el tiaj konsistas ĝis nun mia klientaro; mia reto havas grandajn maŝojn intence por ne kapti tiajn fiŝetojn,—mi nur atendas la malfermadon de la apuda teatro, kiam, kiel vi vidos, apenaŭ estos loko tie ĉi por moviĝi, pro la multnombra teatra en-kaj eliranta manĝantaro. Saĝa homo ĉiam scias atendi la oportunan horon. Manĝu, do, kion kaj kiam ajn vi volos; tie ĉi vi ĉiam trovos la manĝajan ŝrankon plena kaj kelnerinojn ĉiam pretaj por servi mian fidelan Filipinanan amikon." Dum la sekvantaj tagoj mi ofte eniris la luksan restoracion por gustumi iun pokalon da malnova likvoro, manĝi glaciaĵon kun kukoj, kaj, verdire, ĉefe por babili kun la belaj kelnerinoj. Ĉiam mi trovis la saman lukson, la saman movigemon de la nur ŝajne tre okupata kelneraro, kaj la sama manko da klientoj. Tiel ruladis la de mia amiko restoracia afero, ĝis mi ree renkontis lin sur la strato iun tagon. Li tuj prenis min per la brako kaj enkondukis min en najbaran biervendejon, kaj alproksimiginte sian seĝon al la mia li rakontis mallaŭtvoĉe la jenon: "Dank' al Dio, mi nun povas demandi al vi amikan konsilon, ĉar mi bezonas. Mi ĵus sciiĝis, ke la teatro ne malfermiĝos tiun ĉi jaron, pro manko da mono, kaj, pro la sama kaŭzo, mia promesplena restoracio devigite fermiĝos. 'La homo proponas, sed Dio disponas.' Plie, mia dungitaro minacas min per farota striko. Ĉiun tagon mi perdas cent spesmilojn, kaj nun mi ekvidas la fundon de la monsako. Mi havas kap-kaj kordoloron. La lastan nokton mi sonĝis terursonĝon. S'ajnis al mi kvazaŭ pezega palaco surfalis sur min. Ĉu eble ĝi estus tiu, kiun mi tiel ofte vidis en miaj revaĵoj? Se vi bonanime ne proponos al mi iun tujan kaj konvenan remedon, morgaŭ mem mi estos senespere ruinigita." Mi restis momentojn meditema kaj senparola, pensante pri la ĉiuj antaŭaj liaj babilajoj rilate al la "nenecesa antaŭa sperto de klera homo por ke li povu rapide riĉiĝi en Usono per komercado", pri la multaj glaciaĵoj kaj kukoj, kiujn mi manĝis en la luksa restoracio, kaj, pli ol ĉio alia, pri la du belegaj kelnerinoj, kiuj ĉiam koketece servis min. Ho! la amindulinoj! Subite ekskuante min el ĉiuj tiuj ĉi meditaĵoj, mi respondis kun rideto: "Kuragon, ĉiu pluva nubo havas arĝentuman franĝon flanke de la suno. Certe vi kapvestas altforman ĉapelon kaj surportas orenkarigitajn okulvitrojn, sed ne estas la sama ĉapelo ne la samaj okulvitroj per kiuj vi adornis vin la tagon de via unua viktorio. Se ne estus eble retrovi tiujn samajn, mi opinias, ke estus pli saĝe enmetigi en la ĉiutagan ĵurnalon la jenan anonceton:

"Lukse meblita restoracio apud granda "nova malfermota teatro, luebla aŭ aĉetebla "je tre malkara prezo, pro la subita neaten-"dita morto de la patrino de la nuna pose-"danto kaj la neceso de lia tuja forveturo "alilanden por ĉeesti la enterigon. Ne pro-"krastu, se vi volas riĉiĝi!"

"Bone pensita, mi estas savita," li ekkriis, kiam ni disiĝis.

Mi zorgis pri la enmeto de la anonco, sed kiam mi aliris post du tagoj al la anoncita restoracio por sciiĝi ĉu li jam vendis la "orminejon," mi trovis..... skabenan sigelon sur la pordego kaj skribaĵon, kiu avertis, ke per juĝista dekreto oni laŭleĝe vendos la tutan meblaron por pagi la suldojn de ĝia malaperinta posedanto. Kaj efektive Jones malaperis. Mi ne vidis lin plu. Eble li riĉiĝis aliloke per komercado, sed mi dubas ĉu per restoraciaj aferoj.

EDGAR A. MCCLELLAN.

Esperantista Surmura Kalendaro por 1910a.

S-ro J. L. BRUIJN, 170 Kepplerstraat, Hago, Nederlando, informas nin, ke li preparas la eldonon de Esperantista Surmura Kalendaro por 1910.

S'ildo havos amplekson da 25 x 32 centimetroj; ĝi estos bele kolorpresata, reprezentante Esperantan simbolon, laŭ desegnaĵo de sperta desegnisto.

Bloketo havos amplekson da 8 x 12 centimetroj: oni povos forpreni ĉiun folieton, sen difektado.

La antaŭa flanko de l' folietoj surhavos la nomon kaj cifron de l' tago, la nomon de l' monato, kaj kelkajn liniojn por rememordatoj, devizoj, proverboj, k.c.

La postflankoj de l' folietoj surhavos bonan prozon aŭ poezion,

La prezo estos nur 60 spesdekoj kun speciala rabato por kluboj, k.c.

Digitized by Google

Addresses of Esperanto Gazettes

and their subscription price per annum in International Money Unit—₱1.000=1.026 Sm.

* Monthly. ** Fortnightly. † Entirely in Esperanto. || Esperanto and National

SPECIALAJ

"DIA REGNO" * † Sm. 0.90
Paul Hubner Friedridh-Wilhelmstr 66
Mulheim a. Rh., Germany.

"ESPERANTO" ** † Sm. 1.20
8, rue Bovy-Lysberg, Geneva, Switzerland.

"ESPERO KATOLIKA" * † Sm. 2.00
23, Rue Joubert, Paris, France.

"ESPERANTA LIGILO" * † Sm. 1.20
(en reliefpunktoj por blinduloj)
12, rue Soufflot, Paris (V) France.

"ESPERANTA INTERNACIA REVUO" * † Sm. 2.06
Ulloi-út 59, Budapest, Hungary.

"ESPERO PACIFISTA" * † Sm. 2.00
26, rue de Chartres,
Neuilly-sur-Seine, France.

"EUROPA KRISTANA CELADO" * † Sm. 0.75
S-ro Ch. Briquet, rue de la Cité,
Geneva, Switzerland.

"FLUGILA STELO" * † Sm. 1.04
P-ro Schneeberger,
Lusslingen, Switzerland.

"FRATECO" * † Sm. 0.30
J. Luneman, van der Neerstraat 40,
Gravenhage, Holland.

"INTERNACIA PEDAGOGIA REVUO" † Sm. 1.80
en Bystrice-Hostyn, Moravia, Austria.

'INTERNACIA SCIENCA REVUO" * † Sm. 2.80
8, rue Bovy-Lysberg, Geneva, Switzerland.

"INTERNACIA SOCIA REVUO" ** † Sm. 2.40
S-ro R. Louis,
45, rue de Saintonge, Paris (III) France.

"JUNA ESPERANTISTO" * † Sm. 1.00
33, rue Lacepede, Paris, France.

"LA BELA MONDO" *
Bismarkplatz 12 Dresden, Germany.

"LA REVUO" * † Sm. 2.80
76, Boulevard St-Germain, Paris, France.

"LIBERA PENSO" * † Sm. 1.00
S-ro R. Deshays, Sens, France.

"LINGVO INTERNACIA" * † Sm. 3.00
33, rue Lacepede, Paris, France.

"OFICIALA GAZETO ESPERANTISTA" * † Sm. 2.00
51, Rue de Clichy, Paris, France.

"OFICIALA BULTENO DE LA U.E.A." * ||
8 rue Bovy-Lysberg, Geneva, Switzerland.

"TRA LA FILATELIO" * † Sm. 0.80
S-ro J. Fize, Beziers, France.

"VOCHO DE KURACISTOJ" * † Sm. 1.00
D-ro Stefan Mikolajski,
Sniadekich, 6, Lwow, Austro-Galicia.

"LA SPRITULO" * † Sm. 1.20
Richard Bresch,
Kornerstr. 31, Leipzig, Germany.

ALĜERIO

"AFRIKA ESPERANTISTO" * ||
5, rue du Marché, Alĝiers, Algeria.

AUSTRALIO

"THE AUSTRALIAN ESPERANTIST" * || Sm. 1·50
S-ro R. Dossor, Bridge str., Benalla,
Victoria, Australia.

AUSTRIO

"BOHEMIA ESPERANTISTO" * || Sm. 1.7
J. Iglauer, Praha III 495, Austria.

"ĈASOPIS ĈESKYCH ESPERANTISTO" || Sm. 1.00
Praha, Bohemia, Austria.

"INFORMAJ RAPORTOJ" * || Sm. 1.00
K. F. Ahlgrimm, Bandgasse, 31,
Wien VII 1, Austria.

BELGUJO

"BELGA ESPERANTISTO" * || Sm. 1.80
20 Vondelstraat, Antwerpen, Belgium.

BULGARUJO

"LUMO" * || Sm. 2.00
V. Tirnovo, Bulgaria.

Digitized by Google

BRAZILO

"Brazila Revuo Esperantisto" * † Sm. 2.40
S-roj M. Piedade & Co.,
Ruo da Asamblea, Rio-de-Janeiro.

BRITUJO

'The British Esperantist" * || Sm. 1.50
133-136, High Holborn, London, W.C.

"La Esperanta Instruisto" * || Sm. 1.00
17 St. Stephen's Sq., Bayswater, London.

'La Vagabondo" * ||
16 Westbourne Gardens
Hove, Sussex, England.

La Londona Gazeto" * ||
C.-A. Fairman, 70, Romola-road,
Herne Hill, London S. E.

ĈILO

'Ĉilo Esperantista" * || Sm. 1.00
Casilla 1989, Santiago, Chile.

'La Du Steloj" * || Sm 2.00
Casilla 728, Santiago de Chile.

"Esperantaj Skribaĵoj" * || Sm. 0.40
Casilla 1284, Santiago, Chile.

DANUJO

"Dana Esperantisto" * || Sm. 1.10
Gyldenlovesgade 16,
Copenhagen, K, Denmark.

FILIPINA INSULARO

"Filipina Esperantisto" * || Sm. 2.00
P. O. Box, 326, Manila.

FINNLANDO

"Finna Esperantisto" * || Sm. 1.20
Helsingfors, Finland.

FRANCUJO

"Franca Esperantisto" * || Sm. 1.60
46 boulevard Magenta, Paris, France.

"Paris-Esperanto" * || Sm. 0.60
S-ro V. Chaussegros,
3, Place Jussieu, Paris, France.

"Lorena Esperantisto"
Esperantista Grupo en Nancy, France.

"Le Monde Esperantiste" * || Sm. 0.80
3, rue Sophie-Germain, Paris, France.

"Norda Gazeto" * || Sm. 0.40
E. Deligny, boulevard Vouban.
Saint-Omer, France.

"La Normanda Stelo" Sm. 1.00
Liébard kaj Leroux,
14, rue de la Vicomté, Rouen, France.

"Sarta Stelo" * || Sm. 0.40
rue Scarron, 14, Le Mans, France.

"L'Informilo" (jarkvarone)
8 rue de Rome, Calais, France.

"Le Phare Sm. 1.60
Stenographique et Esperantiste" || *
60, Rue des Carmes, Rouen, France.

GERMANUJO

"Germana Esperantisto" * || Sm. 1.5
95, Prinzenstrasse, Berlin, Germany.

Sm. 2.00
"Germana Esperanto-Gazeto" * ||
S-ro H. Wuttke, Pionierstrasse, 21,
Magdeburg, Germany.

"Eho Esperantista" * ||
Wilhelmstrasse 29, Berlin, Germany.

"La Esperantisto" * ||
Talstrasse 27, Leipzig, Germany.

HISPANUJO

"La Suno Hispana" * || Sm. 1.20
S-ro A. Jimenez Loira,
Avellanas, 11, Valencia, Spain.

"Stelo Kataluna" * ||
Rambla S. Isidro, 30,
Igualado, Barcelona, Spain.

"Tutmonda Espero" * || Sm 1.60
Paradis, 12, pral., Barcelona, Spain.

HOLANDO

"La Holanda Pioniro" * || Sm. 1.25
Singel, 386, Amsterdam, Holland.

HUNGARUJO

"La Verda Standardo" * || Sm. 1.66
Ulloi-út 59. IV, 8, Budapest.

"Sciiganto"
Johano Medgyesi,
Alpar u., 8, Budapest VII, Hungary.

"La Pioniro" * †
VI Nagymezo-u 12, 1-16
Budapest, Hungary.

ITALUJO

"Notizie Esperantiste" * ||
6, via S.-Agostino, Palermo, Italy.

"Roma Esperantisto" * || Sm. 1.20
198, Babuino, Rome, Italy.

JAPANUJO

"Japana Esperantisto" * || Sm. 1.60
3, Ĉome, Jurakĉo,
Kojimaĉik, Tokio, Japan.

Digitized by Google

JAPANUJO

"SAMIDEANO ĈIUMONATA" * † Sm. 2.75
S-ro M. Hikosaka,
33 Abekamashi Asakusa, Tokio, Japan.

MALGRAND-AZIO

"GREKLINGVA ESPERANTO" * || Sm. 1.20
Samosa Esperantista Societo
Samos, Asia Minor.

MEKSIKLANDO

"MEKSIKA REVUO" * || Sm. 1.00
Cocheras, num. 2, Mexico, D. F.

"VERDA STELO" * || Sm. 1.00
D-ro A. Vargas,
3a del Reloj, numero 12, Mexico, D. F.

"ESPERANTA GAZETO" * || Sm. 0.75
Calle Morelos, 995, Guadalajara, Mexico.

"ESPERANTA MEKSIKA" * || Sm. 1.25
Str. Perpetua 5, Mexico.

NORVEGUJO

"NORVEGA ESP. GAZETO" * || Sm. 1.20
Sondregate, 4 IV Kristianio, Norway.

PERUO

"ANTAUEN ESPERANTISTOJ" * || Sm. 1.20
Apartado 927, Lima, Peru.

POLUJO

"POLA ESPERANTISTO" * || Sm. 2.00
Hoza No. 40, m. 8, Varsovio, Poland.

PORTUGALUJO

"PORTUGALA REVUO" * ||
215 Rua do Rosario, Porto, Portugal.

RUMANUJO Sm. 1.20

"RUMANA GAZETO ESPERANTISTA" * ||
Soc. Esperantista, Galatzo, Roumenia.

"RUMANA ESPERANTISTO" * || Sm. 2.00
5, Str. I. C. Bratianu, Bukarest, Roumenia.

RUSUJO

"ESTLANDA ESPERANTISTO" * || Sm. 1.60
Weike Kalamaja uul. 7, k. 2, Revel, Russia.

"LA ONDO DE ESPERANTO" * || Sm. 1.06
28 Tverskaja, Moskvo, Russia.

SVEDUJO

"ESPERANTISTEN" * || Sm. 1.40
37, Surbrunnsgatan, Stockholm, Sweden.

SVISUJO

"SVISA ESPERO" * || 8m. 1.20
8, rue Bovy Lysberg, Geneve, Switzerland.

USONO

"AMERIKA ESPERANTISTO" * || Sm. 2.00
186, Fortieth street, Chicago, U. S.

KORESPONDADO

S-ro DIONISIO ANUNCIACION, 21 Labores St., Pandakan, Manila
S-ro PEDRO F. DE JESUS, 25 Labores St., Pandakan, Manila.
S-ro AMADO BONUS, 84 Fraternidad St., Pandakan, Manila.
S-ro ADRIANO SANTIAGO, 72 Labores St., Pandakan, Manila.
S-ro BONIFACIO FERMIN, 68 Labores St., Pandakan, Manila.
S-ro CIPRIANO HERNANDEZ, Kaingin, Pandakan, Manila.
F-ino NAZARIA NATIVIDAD, 159 Fraternidad St., Pandakan, Manila.
F-ino INES JOAQUIN, 89 Fraternidad St., Pandakan, Manila.
S-ro NICANOR SULIT, 85 Labores St., Pandakan, Manila.
S-ro GUILLERMO RESTUA, Bureau of Education, Manila.

deziras korespondadi kun fremduloj per ilust. poŝtkartoj.

PHILIPPINES ESPERANTO ASSOCIATION

The Annual Meeting of the P. E. A. will be held at Esperanto Hall, 85 calle Gastambide, on Monday, July 19, at 6 p.m.

BUSINESS: To receive report of the Executive Committee and to elect President, Vice-President and Secretary-Treasurer for year 1909-10.

W. H. CASE, Sec.-Treas.

The Secretary-Treasurer will not offer himself for re-election and will relinquish the post of editor of FILIPINA ESPERANTISTO owing to insufficiency of time to devote to the duties.

LA BELA MONDO

Artista Internacia Revuo por Belo. La plej eleganta, la plej bele presita, ilustrita gazeto en esperanta lingvo. Aperas regule monatfine.

Jara abonprezo 6 M.-3 Sm.

Prova abono por 6 monatoj 3 M.-1.50 Sm.

Unu kajero kostas M. 0.60.

Oni povas plenumi nur mendojn akompanatajn de mono, kaj ĉiuj monosendaj devas esti farataj poŝtmandate au ĉeke.

Redakcio: D-ro Schramm, Dresdeno.

Presejo kaj eldonejo: F. Emil Boden, Dresdeno.

(Saksujo) Bismarckplaco 12.

ESPERANTO BOOKS at

American Book & News Co.

PLAZA GOITI

or write Sec. P. E. A., Box 326, Manila.

Digitized by Google

LA PAZ Y BUEN VIAJE

Fabrica de Cigarros, Cigarrillos y Picadura

: : CALLE ASUNCION No. 111, SAN NICOLAS : :

PREMIADA CON MEDALLA DE ORO EN LA EXPOSICION DE SAN LUIS : : :

FUNDADA DESDE EL AÑO 1883

Productos selectos y renombrados; empleando solamente en su elaboracion HOJAS ESCOGIDAS de las mejores Vegas de ISABELA y CAGAYAN : : : : : : :

PROBAD Y OS CONVENCEREIS

"LA COPA"

MORIONES 173, TONDO

DESTILERIA ACREDITADA EN EL ORIENTE

Se expenden en este establecimiento

ANISADOS

CARABANCHEL

GINEBRA

y otros vinos del pais en precios muy reducidos.

A. ZIALCITA,
Propietario

HOTEL DE FRANCE

. ESCOLTA—MANILA

CENTRAL POSITION, GOOD TABLE AND ALL MODERN CONVENIENCES : : :



Correspondence in English, Spanish, French and Esperanto

A LINE OF LATE FICTION

REDUCED FROM
₱3.00 TO ₱2.00

SEND FOR OUR LIST

This list includes the latest novels by the best known authors. New titles are received by each mail.

AMERICAN ESPERANTO BOOK

THE TEXT BOOK THAT
IS MOST EXTENSIVELY
USED IN THE STATES

PRICE ₱2.00 - - - - - CLOTH

AMERICAN BOOK AND NEWS CO.
MANILA

Digitized by Google